Tiamaniere ekvojaĝis la bonsipo Esperanto en la nekonitan 1910an, gvidita de ŝipnaro da lojalaj kaj entuziasmaj geviroj, regata de saĝa kaj vigla oficistaro, kaj plenata de fervoraj gevojaĝantoj. Ĝi estas bela ŝipo, sufiĉe vasta, kaj tute martaŭga. Dum la venonta jaro ĝi penos trafi la ĉiujn havenojn de Novanglujo, Aŭguston ĝi haltos ĉe Washington por la "Sesa." Kiom kostos biletoj por ĉi tiu sepmonata vojaĝo? Ĉu kvin-cent dolarojn? Ho ne! Tute ne! Nur kvindek cendojn!

Aĉetu viajn biletojn nune!

Por biletoj kaj pluaj sciigoj turnu al Dr. C. H. Fessenden, Newton Centre, Mass., Secretary "New England Esperanto Association."

MORTO DE SRO. AMPT.

La 18'an de Decembro, en sia hejmo ĉe Cincinnati, mortis Sro. W. M. Ampt, eminenta Esperantisto de tiu urbo. Naskiĝinta en la jaro 1840, Sro. Ampt estis edukata kiel advokato, kaj ĉiun profesion le sekvis ĝis sia morto. Partoprenante multe en la registaraj aferoj de sia ŝtato, kaj atakante multajn leĝojn en la nomo de la popolo, li ricevis la titolon "Statano Ampt" kaj ĉiam ĝin portis kun honor kaj ŝereco. Dum la lastaj tridek jaroj, diras la lokaj ĵurnaloj, li vojaĝis ĉiun someron kun sia edzino, kaj dum la lastaj tri jaroj li vizitis la internaciajn kongresojn de Esperanto. Post-

vivanta estas vidvino, sed neniu filo. Li ĉiam havis grandan fidon en Esperanto, kaj forte kredis en ĝia eventuala grandega sukceso. La sekretario de la Esperantista Societo de Cincinnati skribas: "Kvankam ĉiu Esperantisto en la mondo ploras lian morton, ni en Cincinnati pli sentas ĝin. La perdo estas granda al ni. Li estis konsulo de Cincinnati al Universala Esperanto-Asocio kaj prezidanto de la Ohio Esperanto Association."

Pri Revuoj.—Fremdlandaj gazetoj kaj revuoj estas petataj ne plu presigi la adresojn de *Esperanto News* kaj *Esperanto Student*. La unua ne estas publikigita de pli ol unu jaro, kaj la dua ĵus aliĝis al *Amerika Esperantisto*. Do estas domage, ke eksterlandaj samideanoj ankoraŭ skribas peti provekzemplerojn aŭ informojn pri ili.

Rockland, Maine.—Sino. Maria T. Bird gastigis la Esperantistan Klubon la 15'an de Decembro, en honoro de la naskotago de Dro. Zamenhof. Oni ornamis la domon per esperantajoj, donis al la gastoj rusan teon, konfitaĵoj, k.t.p., laŭ la tea kutimo, kaj Sino. Tibbetts kantis.

McMinnville, Oregon.—Oni preparas grandan kunvenon por la vizito de Sro. Baker, el Chicago, sub la aŭspicoj de la "Kono" Klubo. Tiun esperantan nomon prenis sur sin la ĉefa komerca klubo de la urbo—sufiĉe bona utiligo de vorto el nia lingvo. Oni intencas ankaŭ paroligi Sron. Baker antaŭ la kolegio, alta lernejo, kaj virina klubo—en sama tago!

Kelkaj Statoj.—Dum Januaro kaj Februaro Sro. Arthur Baker, direktoro de *Amerika Esperantisto*, faras grandegan rondvojaĝon inter okcidentaj ŝtatoj California, Oregon, Washington, Idaho, Utah, Colorado, Kansas, Oklahoma, Texas, Missouri kaj Iowa. Li faras propagandajn paroladojn, kelkfoje sub aŭspicoj de kluboj, kelkfoje laŭ administrado de individuoj, kun celo krei klubon.

Portland, Maine.—La Esperantista Societo havis specialan kunvenon la 15'an de Decembro, honorante la naskotagon de Dro. Zamenhof. La prezidanto, Sro. Fellows, parolis pri la vivo kaj laboro de Zamenhof: Sino. Viola de Grys kantis "Ho, Mia Kor!" laŭ Guivv, "Serenado" laŭ Sino. Maria T. Bird, kaj "Mi Aŭdas Vin" laŭ Herbert Harris; Charles L. Foster kantis sian propran tradukon de *Rocked in the Cradle of the Deep* (Lulita en la Lulilo de l' Maro); la sekretario legis "La Kongresa Preĝo" de Dro. Zamenhof, kaj la societo kantis "Saluto al la Verda Stelo" kaj "La Espero." La societo nun kondukas ses kursojn, kaj multe da intereso montriĝas.—Herbert Harris, Sekretario.

San Francisco, California.—La unua kunveno de la nova Esperantista Klubo okazis la 7'an de Januaro, en Council Hall, 419 Jefferson Square. Ni esperas aŭdi paroladon de Sro. Baker dum Februaro, kaj granda aŭdantaro estas certigita. Kiel ateston pri la bezono de Esperanto en tiu

ĉi urbo, mi notis, sur kurtenejo en unu teatro, reklamojn en naŭ lingvoj.—Wm. McDevitt, Sekretario.

Cincinnati.—La Esperantista Societo donas senpagajn kursojn en Esperanto, kaj komencigas novajn klasojn dumonate. La adreso de la societo estas 607 First National Bank Building, kaj la kunvenoj okazas ĉiuvendrede, vespere.

Canada.—A report from the Winnipeg Public Library shows that the one copy of the American Esperanto Book possessed by the library is in constant circulation and that more will be bought. Propagandists should remember that we sell at half price subscriptions for public libraries, and present at our own expense a cloth-bound copy of the Book.

Stato Idaho.—Sro. Bert P. Mill, el Idaho Falls, presigis por senpaga disdonado artikolon de Dro. Ivy Kellerman veritan por la *Popular Science Monthly*, pri The Necessity for an International Language (La Neceseo por Internacia Lingvo). Ĝi estas bonega lumigo de la temo.

"JINGLES."

This pretty book of juvenile poetry is mentioned here because the young authoress has dedicated it to a large number of Esperantists, including Dr. Zamenhof. The title page reads: "Jingles; written for dear friends by Winifred Sackville Stoner, Jr. (when five and six years of age)." Little Miss Stoner has a tremendous vocabulary—no other word describes it when we consider her age. She uses transpositions and circumlocutions with great ingenuity, and while sometimes her sense of meter fails her, at others it makes running flights through four or five long verses without missing a spark. And all this in a book of fifty pages in small type, at an age some years younger than Longfellow is said to have been when he wrote the cramped and limping epic about Mr. Finney and the Turnip. The average mind, used to contact with the average child of five or six, will have hard work resisting the impression that Miss Stoner has received a little collaboration in "Jingles," a mention of which would by no means have detracted from the charms of the little book, which is published by Smith & Butterfield, Evansville, Indiana.

MERGED WITH AMERIKA ESPERANTISTO.

The *Esperanto Student*, a monthly periodical formerly published at Rutherford, N. J., by John H. Brown, has been discontinued because of the publisher's ill health. The unexpired subscriptions will be filled by *Amerika Esperantisto*, but those who are already receiving both periodicals will be required to transfer the *Student* subscription to some other person, as these will not be accepted as additional credits from subscribers to *Amerika Esperantisto*.

IN FOREIGN LANDS

Hungary.—According to the official organ of the Hungarian Esperanto Society, the interest in Esperanto is growing with great rapidity, thirty or forty letters of inquiry being received every day at the central office.

Bohemia.—A detailed report of the national Esperanto Congress at Prague in September has just been issued. This congress was given under the protection of the city council of Prague, which gave it financial support (500 crowns). Though Bohemia was, previous to the congress, one of the most thoroughly "esperantized" countries of Europe, the effect of the congress has been new clubs springing up in many places and wide recognition of the language in official places.

France.—Many classes are being organized among labor unions by the society *Paco Libereco*. The federation of ceramic laborers at Limoges is doing fine propaganda work for Esperanto and has organized a course in the language for non-French workers. The Esperanto organ of Normandy probably carries more advertising than any other Esperanto periodical in the world, being patronized by thirty or more local firms.

Catholic Esperanto Congress.—A congress of Catholic Esperantists is announced for the Easter season of the present year. It is to be held in Paris. The device of the congress ticket is an outline of the Eastern Hemisphere, surmounted by a star and the words: *Unu Safaro kaj Unu Paŝtisto* (One Flock and One Shepherd).

Holland.—The December number of *holanda Pioniro* is one of the best of the national propaganda organs, in both size and contents, and irresistibly suggests the problem: If a little country like Holland can do this well, what ought America to do? Suppose you help to make a fitting reply!

Porto Rico.—The literary and humorous weekly, *Gil Blas*, published at San Juan, reprints from *Amerika Esperantisto* the portrait of Dr. Zamenhof and part of the report of the Fifth Congress. It promises to follow with other articles on Esperanto.

Great Britain.—The Esperanto movement sustained a great loss in the recent death of Major-General George B. Cox, well known to Esperantists as author of the Grammar and Commentary which bears his name, and as translator of numerous books. The solidity and strength of the British movement is well

reflected from month to month in the British Esperantist, a propaganda magazine unsurpassed in size, quality and circulation.

Finland.—A national convention of Finnish Esperantists was held late in September, and a constitution adopted for which it was hoped to secure government approval. In spite of the natural progressiveness of the Finns, and their advanced position on many subjects, Esperanto progresses very slowly, owing chiefly to the unstable political state of the country.

Free Thought Esperantists.—This small society, whose membership is mostly French, reprinted in brochure form the plea of Ferrer's attorney before the court which accomplished his death. Hundreds of copies were sold. Ferrer, now better known than during his life, was an Esperantist and held extremely advanced ground in modern philosophical and educational thought.

Y. M. C. A.—For two years Paul Hubner, whose address is now Deilbruck bei Koln (post restante), Germany, has for two years published a little Esperanto paper for Y. M. C. A. interests. The subscription price is forty-five cents (Mk. 1.80). A translation of the Book of John (Bible) is being printed serially.

Germany.—The movement in Germany continues to show growing strength, bringing out new publications and new clubs. *Germana Esperantisto*, the national organ, promises enlargement to the limit of the postage unit, and will add literary matter and a section of practical discussion of every-day topics.

Roumania.—The Roumanians are making much capital of the fact that the queen, "Carmen Sylva," has taken their society under her patronage. They have one of the largest propaganda organs in the Esperanto world, published at No. 5 strato I. C. Bratianu, Bucharest. There is an Esperanto society of printers in Bucharest.

Unicervo.—This is *La Bela Mondo* revived under a new name. The most artistically-printed Esperanto magazine, with half-tone illustrations on plate paper, tinted border and letter-press work of highest quality. Diverstified and interesting contents. Esperantists should pay special attention to such a magazine, as it is worth a dozen of the feeble and incompetent attempts so frequently made by persons knowing nothing of printing or publishing. Order from publisher, Heckners Verlag, Wolfenbuttel, Germany. Three marks for six months.

LITERATURO

STRANGA SPERTO.

Verkis *Raymond T. Bye*, George School,
Pennsylvania

La vetero estis nubema, kaj fulmotondro minacis. Tial mi devis resti hejme, kaj por pasigi la tempon mi decidis skribi leteron al mia amiko en Nov-Jorko. Ĉi tiu amiko estis bonulo, kaj sperta lingvisto, parolanta kelke da lingvoj. Ofte mi penis interesi lin pri Esperanto, sed ĉiam li ridis kaj mokis la karan lingvon. Kelkajn tagojn antaŭe, kiam mi ree penis paroli pri tiu ĉi afero, ni disputis kaj disiĝis kolere. Nun mi skribos por peti pardonon al li kaj reamikigi.

Post kiam mi estis skribinta la vortojn "My dear Alfred" mi rigardis eksteren tra la fenestro, pripensante kiel komenci. Mi rimarkis ke la nuboj ŝajnis tre nigraj kaj strangaj sed pripensis nenion plu pri ĝi. Tiam mi returnis al la skrib-tablon. Dum miaj okuloj rigardis la paperon mi subite miregis vidi ke la plumingo malrapide malkuŝiĝis, kaj komencis skribi, tute sen helpo, sur la papero. Senkreda, mi frotis al mi la okulojn por vidi ĉu mi ne dormas, kaj ankoraŭ dubema, mi pinĉis min tiel forte ke mi laŭte ekkriis. Tuj ekĉesis la plumo, sed baldaŭ rekomencis. Tiam, tre mirigita, mi atente ĝin rigardadis. Mi vidis tuj ke la plumo skribis tute legeblan leteron al mi, kaj pli mirinde, la skribaĵo estis nedube tio de mia amiko! Kvankam mi estis tre timigita, mi ne povis formovi la okulojn de la vido; tial mi rigardadis trememe dum la plumo skribis la jenan, angle:—

"*Mia kara Riĉjo*: Tiel forte suferas mi ke apenaŭ povas mi skribi. Ho, se mi nur estis akceptinta vian konsilon kaj lerninta Esperanton! Kiam ni laste disiĝis, ambaŭ estis koleraĵoj. Sed la kulpo estis mia, tute mia, kaj mi estas rice-

vinta la justan punadon. Estas nur mia spirito kiu skribas al vi, mia korpo kuŝas en la rivero.

"Mi mortis nur ĉar mi ne povis paroli Esperante. Stranga, eble, sajnas tio ĉi, sed vera ĝi estas. Ho, nebonsenculo estis mi! Lingvisto kvankam mi estis, mi mortis nur ĉar oni ne komprenis mian paroladon. La jena estas la historio pri mia mortigo:—

"Antaŭ du tagoj, mi iris en tiun parton de la urbego kie loĝadas la fremdaj malriĉuloj; afero por kiu mi tien iris estas negrava. Sufiĉe estas diri ke mi estis tie. Dum ke mi promenis laŭ unu de la mallargaj, malpuraj stratetoj de tiu regiono, kvar viraĉoj subite atakis min, kaj min trenis en malgrandan, malluman, subteran cambraĉon. Tie ĉi mi vidis aliajn viraĉojn, kaj rimarkis ke ili ĉiuj estas fremduloj. Kiam mi treniĝis en la ĉambraĉon la virareto komencis bruegi; viroj minacis min per pugnoj, tranĉiloj, kaj poŝpafiloj. Mi facile sciigis la nunan situacion,—ili malprave pensas ke mi estas alia viro, kiun, por ia kaŭzo, ili intencas finigi. Terurigita, mi penis klarigi, sed mi tro baldaŭ sciigis ke neniu de tiu amaseto komprenis angle! Malespere mi parolis france, germane, hispane. Estis senutile. Mi provis ĉian metodon, por montri al ili la eraron. Vane. Ili estis atendintaj viron sur tiu strato. Mi similis al tiu. Mis aperis je la tempo kiam ili atendis la alian. Por ili mi estis li. Sed restis ankoraŭ unu espero. Unu viro kiu ŝajnis kompreni miajn penadojn por klarigi, antaŭen venis kaj diris: "Ĉu vi parolas Esperante?" Bedaŭre mi skuis la kapon. "Tiam mi ne povas helpi vin." Mi ne komprenis la vortojn, sed mi komprenis la signifon—me devas morti. La viraĉoj ne pli longe atendis. Kun kriego de furiozo ili ĵetis sin sur min. Dum unu

momento mi sentis la tranĉilojn similajn al varmegaj feraĵoj en la karno. La varma sango elfluis kaj mi mortis. Se mi estis lerninta la-lingvon Esperanton, mi estus povinta klarigi ke mi ne estis la viro kiun ili serĉis. Sed nun mi devas promeni kiel spirito ĝis mi lernos neniam moki tion pri kiu mi scias nenion.

"Bedaŭre, la spirito de via amiko.

"*Alfred*"

La plumo ĉesis kaj tuj ruliĝis de la tablo. Mi eksaltis por kapti ĝin, sed subitege haltis pro ekbrilego de fulmo, sekvita de la plej laŭta, plej teruriga tondrego kiun mi iam aŭdis. Dum la tondrego malrapide forsonis, nigregiĝis, la pluvego falegis kaj longa, bedaŭra kriegado sonis, tiel stranga ke la sango malvarmiĝis al mi en la vejnoj. Mi tremis, sed baldaŭ rekuraĝiĝis.

Ofte poste mi pripensis la aferon, sed neniam mi decidis ĉu kriegado estis la vento, fajfanta ĉirkaŭ angulo, aŭ efektive la bedaŭra voĉo de mia malĝoja amiko.

"MI NE POVAS ELSPEZI POR TIO"

Laŭ redaktora artikolo en *Harper's Weekly* tradukis *J. D. Hailman*

Kiel ofte, en la daŭro de jaro, oni ripetas la malgrandan frazon "Mi ne povas elspezi por tio"—ordinare per plenda voĉo, kiel oni komprenas la diferencon inter tio, kion oni havas monon por aĉeti, kaj tio, kion oni deziras.

Tamen, oni ordinare, se ne ĉiufoje, povas elspezi por tio, kion oni deziras plej multe. Unu homo, ricevante sole unu dolaron por sia taglaboro, ne povas edziĝi—sed alia povas. Estas tute tial, ke la antaŭa homo sian dolaron deziras uzi alimaniere, ne ĉar la dolaro la vivon ne povas subteni por du, se la amo kaj la amkuneco estas pli valorplenaj, ol tio, kion nedividita dolaro povas aĉeti.

"Kiaj homoj povas elspezi por aĉeti tiajn librojn?" oni demandis al viro en granda Nov-Jorka magazeno—signifante la tre multekostajn antikvajn eldonojn kaj maloftajn presaĵojn kiujn tiu ĉi viro vendadas. "Tiaj personoj, kiaj ilin de-

ziras," li respondis. "Okaze, persono kiu posedas milionojn envenas tien ĉi, rigardas tre deziremege unuan eldonon, kiu valoras, eble ducent dolarojn, sed fine rifuzas aĉeti, dirante 'Mi ne povas elspezi por ĝi.' Tamen, mi eble scias ke la plezurŝipo de tiu homo lin kostis **sepdek** kvin mil dolarojn, kaj ke en la pasinta semajno li pagis dek mil dolarojn por ora manĝilaro. Eĉ milionulo ne povas aĉeti ĉion sur la terglobo; estas necese ke li elektu, same kiel aliaj homoj; sed, same kiel ili, li elfaras elspezi por tio, kion li plej multe deziras."

Je tio, por kio oni povas aŭ ne povas elspezi, oni kutime signifas tion, kion la pleja gajnaĵo kiun oni povas akiri, lasas aŭ ne lasas al ni aĉeti. Sed, jen estas alimaniere kalkulado: "La kosto de io ajn" diris Thoreau, "estas la kvanto de tio, kion mi nomas *Vivanteco*, kiun oni devas interŝanĝi por ĝi, aŭ nune aŭ ultime." Stevenson diris: "Mi kutime pripensas, eble pli klare, ke la prezo oni devas pagi por mono devas esti pagata per libereco."

Jen estas nova mezuro de tio, por kio oni povas elspezi—ne por kion da aĉeteblaj objektoj oni povas interŝanĝi sian vivadon kaj liberecon, sed, kion da vivado kaj libereco oni volas interŝanĝi por ia ajn aĉetebla komercaĵo; unuvorte, por perlabori kian vivsubtenon oni povas elspezi. "Ĉu vi deziras enspezon po mil dolaroj?" diras Stevenson, "aŭ po kvin mil, aŭ dek mil? Kaj ĉu vi povas elspezi por tio, kion vi deziras?"

Kia revolucio okazus en la mondo de komerco kaj financo se ĉiu homo volus fari kaj respondi vere tiun demandon al si mem!

LA CINIKO

Verkita de *Walter O. Anderson*

Antaŭ multaj jaroj vivis unu ciniko. Li opiniis, ke ĉio en la naturo estis **nebona**, kaj ofte li diris al si mem, ke li mondon pli bona povus krei.

En unu tago li ripozadis sub granda kverko, kaj moke rigardis humilan kukurbon kiu kreskis apud liaj piedoj.

"Jen!" li diris, "kiel malbone estas farata la mondo! Tie estas granda kukurbo, kiu kreskas sur la tero, tenata per malgranda, malforta ŝnureto, kiu ne povas teni ĝin sur la tero nek teni ĝin super la tero; kaj tie estas granda kverko kiu produktas tre malgrandajn glanojn. Vere, la granda kverko povus pli bone subteni la grandajn kukurbojn, ol tiu malgranda kreskaĵo; kaj la kukurbujo pli bone povus produkti tiujn malgrandajn glanojn. Kiel stranga kaj malĝusta estas la mondo.

Apenaŭ li ĉesis paroli, kiam glano falis kaj frapis lin sur la okulon. Li ekleviĝis kaj ekkriegis pro doloro, dum li pripensis: "Se tiu kverko produktus grandajn kukurbojn anstataŭ malgrandajn glanojn, mi nun estus mortinta homo." Post tiam li ĉesis siajn plendojn kontraŭ la naturo kaj Dio.

La saĝa viro zorgas pri siaj propraj aferoj.

LA KANTO DE LA VENTO

El Juna Esperantisto

"Dormu pace, Infano senkulpa, en blanka lulilo, sub la bonodora tilio de la ĝardeno kvieta, apud la patrino atenta.

Malpli peza ol flugilo de papilio, ol lanugo de cigno, ol la matena vaporo, kiu duonkaŝas la horizonton, mi karesas cian vizaĝon, apenaŭ levetante cianj silko-similajn harojn super cia delikata frunto.

Mi kunportos al ci: el la ŝtonaj montetoj; la odoron ebriigan de la sovaĝaj floroj; el la profunda ombro de la misterplena arbaro, la kanton de la birdoj; el la trankvila lageto, la murmuron de la kanoj plendemaj; el la senfina ebenaĵo, la ĉifigon de la flora tritika oceano sub la blua ĉielo."

Kaj la malgranda infano, ne vekigante sub la malvarmeta blovado, ekridetas, malfermas siajn manojn por kapti ĉion, kion alportas la dolĉa venteto.

* * *

"Tru pluen, Maristoj, sur la oceano senlima. La ĉielo estas el lazuro, la maro el safiro. La ondoj dancas gaje ĉirkaŭ la ŝipo. Mi volas nur gliiti facile,

kuri de la Oriento al la Okcidento. Kiel atleto, dum ripoztempo, ludas delikate kun junaj infanoj, mi forgesas mian teruran potencon, mi ŝvelas mole la blankajn velojn kaj puŝas vin, malrapide, al la haveno. Morgaŭ, eble, saltigante el mia profunda brusto, mia blovo senkatenigita suprenlevos ĉielen la furiozajn ondegojn, balaos la supraĵon de la maroj. Tiam, ho Maristoj, alkroĉiĝintaj mal-espere al tiu ridinde malfortika lignopeco, vi alvokos vane la Madonon kaj la Sanktulojn, la Anĝelojn kaj la Diablojn. Kiel infanan ludilon, mi kunportos vin sur miaj gigantaj flugiloj, al la nekonataj senfundaĵoj. Hodiaŭ, ridu: mi ludas!"

Jen, la maristoj ridas kaj kantas, la ŝnuregoj sin streĉas, la veloj ŝveliĝas, la ŝipo naĝas malrapide sub la granda blua ĉielo, kaj la ondoj, borderitaj de blanka ŝaumo, batetas ĝoje, ameme, ĝiajn flankojn.

* * *

"Sur la mallarĝaj vojetoj, marŝu, geamantoj! La Naturo estas malpli dolĉaj ol la brilo de viaj okuloj. Oh! kiom da aliaj, jam pasis tiele sur la samaj vojetoj! Ili marŝis, ili marŝis, preskaŭ ne tuŝante la teron, la manoj interplektataj, la rigardoj ravataj, balancante siajn mallarĝajn taliojn laŭ la ritmo de la marŝado, inter la dornbariloj. Foje, ili rigardis sin reciproke, ebriaj de juneco kaj vivosento, kaj, kiel bonodoran rozkoloran neĝon, mi paligis sur tiuj dudekjarajn kapojn, la florojn de la pomarboj. Malaperas la paroj eksamiĝintaj, kaj ne plu revenas, la vintroj postsekvas la printempojn; sed, ĉiujare, la pomarboj denove sin kovras per floroj, kaj aliaj paroj enamigantaj venas sur la mallarĝaj vojetoj. Paŝu, paŝu, paroj feliĉaj, amu kaj forpaŝu!"

Gojradiaj paroj, kredante ke ili entenas en siaj manoj la Feliĉon, la Estanton, kaj la Estonton, iras malrapide sub la florkovritaj pomarboj, kies kvazaŭ-neĝo falas, falas, turnirante, sur iliajn kapojn.

* * *

"Blinda kaj malgaja, kiam ĉio dormas, mi blekas sub la ĉielo senstela, mi skuas

la nestojn sur la arboj, mi krakigas la pordojn kaj fenestrojn de la domoj izolataj, mi igas la hundojn boji en la kortoj de la farmodomoj. Mi malebligas la ripozon de la malsanulo en lia lito, mi kantas funebran arion en la orelojn de la maljunuloj. Mi estas la elvokanto de la mallumaj ideoj, la memoriganto de la malgataj tagoj, la anoncanto de la malsperoj. Mi estas la malĝoja kantisto, kies voĉo enpenetras la korojn superplenajn de doloro.”

Kaj la birdoj malkvietaj, en siaj skuatjaj nestoj, kaŝas siajn kapojn sub siajn flugilojn; la songoj teruraj igas la infanojn alvoki la patrinojn dormantajn; la malfeliĉulo metas sian manon sur sian koron suferantan; la malsanulo kaj la maljunulo rigardas timege la ombron minacan.

Alvoko

Nepre, mi amas vin, oh, Vento, kia ajn vi estas, ĉu karesema, ĉu harda ĉu malvarmega, ĉu bruliga—gaja aŭ malgaja—potenca aŭ malforta—kolera aŭ ludema! Mi amas vin, pro ĉiuj memorajoj, kiujn vi levas en mia koro. Vi lulis miajn infanajn revojn, vi refreŝigis mian junulan frunton, bolantan de fervoro, ebriga de Amo, superplena de antaŭplanoj.

Blovu dolĉe, blovegu forte, blovu iel ajn, per ĉiuj buŝoj viaj, ĉu delikataj, ĉu fortegaj.

Kaj, iam, kiam mi dormos por eterne en la vilaĝa tombejo, kie dormas la miaj, vi ĝemigos super mia kapo la grandajn abiojn, kies etenditaj nigraj brakoj ŝirmos mian lastan dormadon.

LEON CHARPENTIER.

LA PROGRESOJ DE LA SISTEMO METRA

Originale verkita de Prof. Marcel Finot, por “Eho Esperantista”

Tiuj, kiuj vagadante tra la labirintoj de antikvaj mezuroj, ricevas subitan konon de sistemo metra, sentas saman senton de bonstato, kiel vojaĝanto alvenanta en mirinda parko, post eksplorado en densa arbaro. Sed oni ĉion kutimas, kaj kiam

oni ofte admiris la belecon, oni forgesas ĝin. Certe ni scias ankoraŭ, ke sistemo metra estas mirinda afero, sed ni perdis ĝian ideon internan, ĉar ni ne konis la densan arbaron, tra kiu vagadis niaj patroj.

Tiuj, kiuj ĝin ne konos, ne estos tiel supersatigitaj. Kiam, post unu centjaro, la epoko de prezentado de mezurilaj normoj okazis en Francujo, la 22’an de Junio 1899, telegramoj alvenintaj el Rusujo sciigis nin, ke tiu paca kaj glora datreveno estis festita per publikaj ĝojadoj kaj solenaj kunvenoj universitaj. Efektive oni ĵus oficialigis leĝon, kiu permesos, post unu jaro, liberan uzon de mezuroj metraj en Rusa Imperio, kaj la homoj kleraj, kiuj konis ĝian valoron civilizacieman, salutis tiun leĝon kiel grandan bonfaron.

Se oni komparos al la unuoj decimalaj la malnovajn unuojn, varieblajn laŭ regionoj kaj kutimoj, posedantajn nenian rilaton inter si, oni rekonas, ke la sistemo metra estos fortika ŝparemilo por laboro kaj penso, kies graveco kreskas kun kvanto da tio, kion ni devas lerni, antaŭ ion produkti. Ĝia disvastiĝo estis estonta tre rapida. Sed ni ne devos forgesi ke, dum jaroj tuj posteaj al ĝia eltrovo. Eŭropo havis aliajn gravajn zorgojn: post kelkaj jaroj, ĝiaj devenoj ŝajnis ĝin suspektindan kaj malhelpis ĝiajn progresojn.

Nur post unu duoncentjaro okazis forta antaŭenpuŝo, kaj tiu puŝo estis tiel rapida, ke, de 1861 ĝis 1870, Germanujo, Unuigitaj Ŝtatoj kaj Anglujo akceptis ĝin liberan aŭ leĝan, kaj latinaj popoloj forĵetis siajn antikvajn mezurojn.

Hodiaŭ longa estas la listo de la landoj posedantaj devigan sistemon metran. Jen estas tiu listo: Aŭstrujo, Belgujo, Brazilujo, Bulgarujo, Ĉilujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Holandujo, Hungarujo, Kolombio, Italujo, Luksemburgo, Meksiko, Montenegro, Norvegujo, Peruo, Portugalujo, Respubliko Argentino, Rumanujo, Serbio, Svedujo, Svisujo, Uruguaj, kaj kelkaj landoj de Sud-Ameriko.

Aliaj landoj akceptis ĝin, sed ne de-

vige: Bolivio, Danujo, Egiptujo, Unuigitaj Ŝtatoj, Anglujo kaj ĝiaj kolonioj, Grekujo, Guatemala, Japanujo, Turkragua, Paraguay, Rusujo, Siamo, Turkujo, Venezuela.

En Unuigitaj Ŝtatoj, dum leĝo de 1866 igis devigan sistemon metran, nenia leĝo de Unuigo rekonis la unuojn; nur leĝoj de diversaj ŝtatoj malsame sankciigis ilin. Tamen, de 1899 kaj 1902 la unuoj estas leĝaj en milita medicino kaj poste en tuta hispitala ofico. Geodesio kaj ĉiuj sciencoj uzas ĝin jam de longe.

Ĉiu jaro alportas progreson: Japanujo akceptis ĝin en 1891. Rusujo en 1900. Dum du jaroj oni kontrolis 250,000 ilojn metrajn en Rusujo; en Japanujo 160,000 ilojn de pezo ĉiujare. Iom post iom la sistemo metra penetros, per nura forto de sia supereco de aranĝo, al kiu oni povas aldoni la superecon numeran de popoloj, kiuj ĝin uzas. Kiam oni akceptas ĝin, oni eniras en granda familio; kaj utiloj devenantaj el ĝi estas multegaj.

En Anglujo, la sistemo estas permesata de 1866, kaj leĝigita en 1896, samtempe kun malnovaj unuoj. Ĉambro de lordoj decidis ĝian leĝon devigan en 1906, sed Ĉambro de Komunumoj forĵetis la 22'an de marto 1907, kun malgranda plimulto da 32 voĉoj.

Tiu lasta venko de antikvaj mezuroj estas treege malpligrandigita, kiam oni konas la bataladon kondukitan kontraŭ la sistemo decimala, de aro malmulta, sed agema, kiu penadis kaj sukcesis prokrasti ĝiajn progresojn. Antaŭ tiu konservema aro, kiu deziras daŭrigi la vivon de unuoj britaj, estos potenca Decimala Asocio, kiu klarigas al la popolo la utilojn de mezuriloj kaj moneroj novaj, kolektadas kaj disigas sciigojn, grupigas influojn, kaj kuraĝigita de venkoj senĉesaj sed nur partaj, paciĝos nur kiam ĝia celo estos atingota.

Cetere Decimala Asocio trovas neordinarajn apogojn. Inĝenieroj anglaj laborantaj por registaro de Egiptujo kaj Siamo, devas uzi nur sistemon metran; laŭ raporto sendita de Bangkok al Lordo Salisbury, ili ne plu volas uzi, post kelkaj monatoj, alian sistemon.

Alia nova okazintaĵo alportis al ago metra potencan apogon. En aro de reformoj kiujn ĝi entreprenis kun zorgo, metodo, indaj de atento de ĉiuj popoloj, registaro ĥina enskribis tiun de mezuroj, kvankam multaj komercistoj anglaj klarigis al L. M. Ambasadoro ĥina en Londono, kiom estus grava, se la du plej grandaj imperioj de l'mondo povus posedi samajn mezurojn; registaro ĥina akceptis la sistemon metran, kaj decidis, ke nova valoro de "tchi" estos 32 cm. Do 25 tchioj = 8 metroj; tio ĉi permesas facilan transiron de unu sistemo al alia. Tiu reformo estas nur komenco: la intenco estas evidenta, kaj ne permesas malantaŭeniron; la komercistoj anglaj, ne povante sukcesi en siaj demandoj, devos uzi la ĥinajn mezurojn; tio estas do serioza sukceso.

El tiuj linioj rezultos ja, ke historio de sistemo metra estas tre interesa; neniam, pli ol nun, oni laboris tiel sisteme kaj ageme por ĝia disvastiĝo, kaj neniam ĝiaj venkoj estis tiel rapidaj. La observantoj atentaj de ĝia progreso ne povas dubi, ke baldaŭ ĝiaj bonfaroj atingos ĉiun homaron.

BEETHOVEN

El Germana Esperantisto

La koncerto estis finita. La pordegoj de la koncertsalono estis malfermitaj, kaj la vizitintoj torente ekfluis sur la straton. Ĉiu preparolis la muzikon, kiun li estis ĵus aŭdinta; estis precipe la naŭa simfonio de Beethoven, pri kiu oni disputadis. Mi mem ankaŭ kune kun du amikoj, kunlernantoj de mi, ĉeestis la koncerton, kaj nun ni hejmiris. La enhavo de nia preparolado estis la belega Adagio de la nomita simfonio, kaj ni fervore disputadis, ĉu la kapelestro ĉi-tiujn aŭ tiujn taktojn estis ĝuste perceptinta, ĉu ludinta kun la plej granda delikateco de la muzika sensacio. Tiel fariĝis, ke ni venis ĝis mia loĝejo, sed nia disputo ankoraŭ ne estis finita. Tial mi kuniris ĝis la loĝejo de miaj amikoj. La vojo tien kondukis tra malvasta strateto. Antaŭ malnova, malpura domo kun alta

frontontegmento ni senvole ree haltis. Unu el miaj amikoj montris frontonfenestron, kie estis hela lumo. Silente ni rigardis sur la alian kaj poste ni daŭrigis nian vojon. Ni ne bezonis multe klarigi, ni ĉiuj sciis, kion nia amiko volis diri: tie tupre loĝis rimarkinda homo, strangulo, kiu ankaŭ estis unu el miaj kunlernantoj. Ĉiam lia vizaĝo estis maluma kaj murmurema, neniam oni vidis rideton sur liaj lipoj, neniu aŭdis afablan vorteton de li. En teatroj kaj koncertoj oni lin ne vidis—unuvoite, li estis strangulo.

Baldaŭ ni alvenis al la loĝejo de miaj amikoj. Kun levigita koro ni adiaŭigis. Ni ankoraŭ unufoje estis sentintaj la sanktecon de la ĉielnaskita muziko!

Mi devis reiri sola. La nokto estis milda, la steloj klarege brilis. Ankoraŭ unufoje mi devis preteriri la malnovan frontondomon. Sed kio estis? La frontonfenestro estis malfermita, kaj la tonoj de violono tremis el la ĉambreto eksteren en la nokton. Kaj tiu ĉi melodio—ja—ho Dio—ĉu ĝi ne estas tiu, kiun mi ĵus aŭdis? Efektive—tio estas la Adagio el la naŭa sinfonio de Beethoven. Kaj kiel ĝi estas ludata! Milfoje pli bele ol en la koncerto! Kion la kapelestro post multaj provoj, post longtempa studado de ĉi-tiu Adagio ne povis tiel esprimi, kiel Beethoven ĝin sentis, tion la strangulo tie supre en la malvasta frontonĉambreto perfekte kaptis, tiu homo plene kaj tute komprenis la inspiron de Beethoven!

Jen la bildo de Beethoven en mia animo vekigis: ĉu li ne ankaŭ estis tia strangulo, tia enigmo?

Subite la ludado ĉesis, la fenestro estis brue fermita kaj la lumo estingigis; fariĝis mallume tie supre—sed mi vidis per la animo tiun homon ploranta kuŝante sur sia mizera kuŝejo, ploranta, ĉar la homoj lin tiel nekkonis, ploranta pri si mem, ĉar li havis tian depuŝantan konduton, dum tia ora kerno dormetis en li.

Malrapide mi iris hejmen. La nokto estis milda, la steloj klarege brilis. . .

Alfred Richter.

KANTO PRI PATRUJO

B. Bjornson (pri Norvegujo)

Jen kuŝas landeto ĉe neĝo eterna,
Kaj nur en la valo kreskaĵo sin trovas.
Ondegoj ĝin batas per bruo legenda,
Sed tamen landeton tre forte ni amas.

Genue ŝi tenas gefilojn la siajn
Kaj donas al ili legendon pentritan;
Ni legas ĝis vango fariĝas malseka,
Kaj tiam ŝi ridas kaj estas kontenta.

Jen mano en mano kaj kune ni iras,
Kaj kuras kapelon malalte kuŝantan,
Kaj tiam maljuna avino ordonas:
“Ĉi-tie vi ĵuru defendi landeton.”

Ŝi kovras deklivon per neĝa tavolo,
Dirante, ke knaboj ĝin maŝsupreniru.
Ŝi rompas per blovo la nord-mar-spegulon
Dirante, ke knaboj la velojn eklevu.

Ŝi metas plej belajn knabinojn en rondon,
Ke ili nin sekvu per rido kaj kanto,—
Kaj mem ŝi sidadas sur seĝo legenda,
Ŝajnante, ke nun ŝi fariĝas kontenta.

Kaj tiam eksonas kun bruo—“Antaŭen!
Kuraĝe ni iru al celo celita!
Pro norda patrujo kaj lingvo norvega!”
Ĝis montoj resonos per bruo fortega.

Kaj tiam ektondras fortega ekstazo,
Dum jen ŝi nin baptras per akvo ondanta;
De tiam sin montras fantomoj de l'
monto,

Kaj ĉiam nin sekvas ĝis tombo senvive.

Tradukis *Leo Nordrum.*

SE ESTUS ALIE—?

Bone, ke la hom' ne vidas
Kion, en alia sidas.
Se singarda kapableco
Ŝajnus esti ne boneco;
Se la homo vidus ĉion—
Legus vorton kaj folion
En la libro de la koro,
Hor post horo, hor' post horo,—
Malestimus ni (mi timas)
Ĉiun, kiun ni estimas!

—*H. I. Keyes.*

Weis CONCENTRATED FILING SYSTEMS

Nine different kinds of drawers are made for the Weis Desks and Weis Filing Cabinets shown here. You can combine in either just the ones you need—vertical letter files, document drawers, catalog files, card indexes, check files, etc. Your filing capacity is thus varied, yet compact. Solid Oak, Roller Bearings and Dust Proof Construction make these wonderful values, as your dealer will tell you. We will ship direct if he will not supply you.

WE PREPAY FREIGHT

at these prices, to all points in the U. S. east of Mont., Wyo., Colo., Okla. and Texas.

In these states and beyond add 15 per cent.

Four Drawer Vertical Letter File No. 421, for correspondence only, holds 20,000 letters, freight paid..... **13.25**

Combination Vertical File and Card Index, No. 425 (15,000 letters and 8,000 cards), freight paid..... **\$16.75**

Fiat-Top Desk, No. 355, "A Complete Office on Legs," your choice of drawers, freight paid..... **\$22.00**

Get Posted on these and other Weis Business Conveniences. See a dealer or a catalog. Let us send you some valuable hints for saving office space and time.



Weis
Weis
Weis



The Weis Mfg. Co., 147 Union St., Monroe, Mich.

SAMIDEANO ĈIUMONATA

Internacia Ilustrata Esperanta Revuo.
Redaktata de Eminentaj Okeidentuloj kaj
Orientuloj, por literaturo, belarto, scienco,
familia legilo, industrio, ktp., kuir aldono de

BELEGE KOLORIGITA ORIGINALA KSILOGRAFIA

PENTRAĴO.

(37 x 25 cm.) sur luksa papero per Speciala
Japana Presarto.

Jara abono, \$1.35; unu numero, 12c.

Abonpago per poŝt mandato aŭ mono.

Sin turni al Verda Stelo & Co., (Sro.) M.
Hikosaka, 33 Abekawamachi, Asakusa, Tokio,
Japanujo.

SPECIAL TERMS.

We supply "on sale" copies of the American Esperanto Book only, in cloth or paper binding only, to the proper officer of an Esperanto club, or to a responsible agent, remittance subject to sale; unsold copies to be returned at our demand, in good order, charges paid by shipper.

GREAT BUNDLES OF SAMPLE COPIES. We have, of a few issues during 1909, quite a number of unsold copies. These do NOT include January, February, March, April, May, November or December. We will send you a bundle of these (not selected) for propaganda use if you will pay us the postage. The sample copy rate is four cents a pound, and they average about seven copies per pound. How many for you?

CONCERNING RENEWALS—Subscribers of this magazine are requested to note that the date of expiration of subscription, printed on wrapper, is our only receipt for payment of renewals. Two weeks is usually necessary to make the change. Renewals should always be sent in advance of expiration in order to avoid confusion, or missing copies. EXPIRED cards are removed from our automatic addressing machine, and the only way to be SURE of getting every number is never to let your subscription expire.

SPEAK ANOTHER LANGUAGE

ENGLISH · GERMAN · FRENCH
ITALIAN · SPANISH

CORTINAPHONE

"The Original Phonographic Method"

Awarded Medals—Chicago 1893, Buffalo 1901

"Most sensible plan to acquire languages." Clear-
est and most progressive method ever published."

Such is the testimony of thousands who have used the Cortinaphone Method of Language study. It enables anyone to learn any language in the easiest, simplest, most natural way. No costly native teacher, no loss of time from regular work, no drudgery.

The Cortinaphone Method makes language study a pleasure and at the same time gives you a practical speaking knowledge. You learn to speak and understand a foreign tongue as you learned your own language, by listening to it. It is the

IDEAL HOMESTUDY METHOD

Always ready when you have a few moments to spare. It is endorsed by the ablest teachers and philologists of the world.

Records Furnished in Any Language

Largest collection of language master records in all tongues. Our free

booklet tells all about the Cortinaphone Method; also our easy payment plan.

Write for it today.

CORTINA ACADEMY OF LANGUAGE.


217 Cortina Bldg.
44 W. 34th St.,
New York.



CORTINAPHONE

"Parfumejo de la Fenikso"

de P. Gautier & Cie., Le Lilas, proksime Parizo, Francujo, sendas, senpage, afrankite, al ĉiuj samideanoj kiuj ĝin petas, sian katalogon de parfumejo kaj saponejo, kun parfumita poŝalmanako.



'The very best manual yet produced.'—*The British Esperantist*